

KROZADO SUR LA LINGVOJ

1-Enkonduko pri lingvoj

Denaska lingvo. Vidu la manon, ĝi havas 5 fingrojn. Tiel estas por iu infano. La infano aŭdas la lingvon de la patro, la lingvon de la patrino, la komunan lingvon de la gepatroj kaj la lokan lingvon. Por la polekso : miaj ideoj, kiuj vagadas nude en mia cerbo ; mi devas vesti ilin per iu lingvo konata de mi kaj komprenata de tiu, al kiu mi volas paroli.

Bebo, infano, estas ekspoziciigita al lingvo, kiel iu persono sub duŝo.

En la lernejo : instrulingvo = oficiala lingvo de tiu koncerna lando. En la lernejo eble oni instruas aliajn lingvojn.

Hejme : tie aŭdiĝas lingvoj, kiuj ne nepre samas kiel la enlernejaj lingvoj. Indiĝenaj lingvoj, speciale en Afriko. Dulingvaj, plurlingvaj personoj, poliglotoj.

La kvar parolkapabloj. Aŭdi kaj kompreni, legi kaj kompreni, paroli, skribi.

	Mi elsendas ->	Mi ricevas, kaptas <-
Parole	Paroli	Aŭdi kaj kompreni
Skribe	Skribi	Legi kaj kompreni

La lingvoj en nia lando. Nepre menciu la multnombrajn lingvojn de la enmigrintoj.

Lingvoj en Eŭropa Unio (23)

Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj : 6 : en, fr, es, cn, ar, ru.

Lingvoj en la mondo : proks. 6000

Tradukado estas skriba laboro.

Interpretado estas parola laboro. Samtempa aŭ posta interpretado.

2-Ni observu la nombrojn inter 11 kaj 20.

En kiu momento aperas la vorto 10 ?

Doni la okazon al la partoprenantoj prezenti la sistemon en iliaj lingvoj.

	Fr	It	Es	En	Jp	De	Eo
1	Un	Uno	Un	One	Ichi	Eins	Unu
2	Deux	Due	Dos	Two	Ni	Zwei	Du
3	Trois	Tre	Tres	Three	San	Drei	Tri
4	Quatre	quattro	cuatro	Four	Shi	Vier	Kvar
5	Cinq	Cinque	Cinco	Five	Go	Fünf	Kvin
6	Six	Sei	Seis	Six	Roku	Sechs	Ses
7	Sept	Sette	Siete	Seven	Shichi	Sieben	Sep
8	Huit	Otto	Ocho	Eight	Hachi	Acht	Ok
9	Neuf	Nove	Nueve	Nine	Ku	Neun	Naŭ
10	Dix	Dieci	Diez	Ten	Ju	Zehn	Dek
11	Onze	Undici	Once	Eleven	Ju ichi	Elf	Dek unu
12	Douze	Dodici	Doce	Twelve	Ju ni	Zwölf	Dek du
13	Treize	Tredici	Trece	Thirteen	Ju san	Dreizehn	Dek tri
14	Quatorze	Quattordici	Catorce	Fourteen	Ju shi	Vierzehn	Dek kvar

15	Quinze	Quindici	Quince	Fifteen	Ju go	Fünfzehn	Dek kvin
16	Seize	Sedici	Diez y seis	Sixteen	Ju roku	Sechzehn	Dek ses
17	dix-sept	Diciassette	Diez y siete	Seventeen	Ju shichi	Siebzehn	Dek sep
18	dix-huit	Diciotto	Diez y ocho	Eighteen	Ju hachi	Achtzehn	Dek ok
19	dix-neuf	Diciannove	Diez y nueve	Nineteen	Ju ku	Neunzehn	Dek naŭ
20	Vingt	Venti	Veinte	Twenty	Ni ju	Zwanzig	Du dek
21	Vingt et un	Ventuno	Veintiuno	Twenty one	Ni ju ichi	Einundzwanzig	Du dek unu
22	Vingt-deux	Ventidue	Veinte y dos	Twenty two	Ni ju ni	Zweiundzwanzig	Du dek du
	La vorto 10 aperas ĉe 17	La vorto 10 aperas ĉe 11 kun eta modifo: dieci → dici Ekde 17: alia vico	La vorto 10 aperas ĉe 16	La vorto 10 aperas ĉe 13 kun eta modifo: ten → teen La «teenagers», kun aĝo de 13 ĝis 19 per -teen estas adoleskantoj.	La vorto 10 aperas ĉe 11	La vorto 10 aperas ĉe 13	La vorto 10 aperas ĉe 11

3-Kie aŭdiĝas pluralo ?

Maldekstre ? Dekstre ? Meze ?

Fr. : L'oiseau, les oiseaux : *Maldekstre* (birdo).

Le cheval, les chevaux : *Maldekstre kaj dekstre* (ĉevalo)

De. : Der Keller, die Keller : *Maldekstre* (kelo).

Die Stunde, die Stunden : *Dekstre* (horo).

Der Bogen, die Bögen : *Meze* (arko).

Der Band, die Bände : *Maldekstre, dekstre kaj meze* (libro, volumo)

Kiswahili : **Mututsi, batutsi** : *Maldekstre*. (tutsi = kasto en Rŭando kaj Burundo)

Jp. : Kodomo, kodomotachi : *Dekstre*. (infano)

Eo. : Libro, libroj: *Dekstre*. Ĉiam.

En. : The potatoe, the potatoes : *Dekstre* (terpomo).

Child, children; Woman, women; Man, men; Foot, feet....

4-PRI SEKSO

Kiu estas la sekretario (dungito) ? Viro ? Virino ?

Kiu estas la estro (dunganto)? Viro ? Virino ?

Laŭ prezento de Claude Piron

Lingvo	Vortgrupo	Sekso de la dungito	Sekso de la dunganto
fr	son secrétaire	Konata	Ne konata
fr	sa secrétaire	Konata	Ne konata
de	sein Sekretär	Konata	Konata
de	seine Sekretärin	Konata	Konata
de	Ihr Sekretär	Konata	Konata
de	Ihre Sekretärin	Konata	Konata
en	His secretary	Ne konata	Konata
en	Her secretary	Ne konata	Konata
eo	Lia sekretario	Konata	Konata
eo	Lia sekretariino	Konata	Konata
eo	Ŝia sekretario	Konata	Konata
eo	Ŝia sekretariino	Konata	Konata
jp	Kare no hisho	Ne konata	Konata
jp	Kanojo no hisho	Ne konata	Konata
Jp : kare = li ; kanojo = ŝi ; no = de, genitivo ; hisho = sekretario			

5-Amika formo, ĝentila formo.

Paroligi la studentojn, ke ili trovu la 4 situaciojn.

Kiom da vortoj ekzistas por tiuj 4 situacioj ?

Poste : valorigi la lingvokononajn de la partoprenantoj, demandante al ili pri iliaj lingvoj.

	Franca		Itala		Hispana		Angla		Japana		Germana		Esperanto	
	Unu pers -ono	Plura -j pers -onoj	Unu per - son -o	Pluraj perso -noj	Unu perso -no	Pluraj personoj	Unu per - son -o	Plura -j pers -onoj	Unu person- o	Pluraj personoj	Unu pers -ono	Plur aj per - son -oj	Unu pers -ono	Pluraj perso -noj
Am-ika formo	Tu	Vous	Tu	Voi	Tu	Vosotros	You	You	Anata	Anatatachi	Du	Ihr	Vi	Vi
Ĝentila formo	Vous	Vous	Lei	Loro	Usted	Ustedes	You	You	Anata	Anatatachi	Sie	Sie	Vi	Vi

Estas precizaj lingvoj kun 4 vortoj por 4 situacioj. it, es, ...

Estas lingvoj kun iu ĝenerala sistemo: nur unu vorto. en, eo, ...

Estas lingvoj kun 2 aŭ 3 vortoj. fr, de,